Tiutempe FESTO multe inovaciis, ĝi eldonis proprajn tasojn, ĉemizojn kaj pli. Dum la renkontiĝo grupo de homoj ĉirkaŭ tablo diskutis kiel aspektu la moneroj, kiom ili valoru kaj kiel ili funkcii.

Post la somero Aleĉjo kontaktis kun presejo de plastaj moneroj por taksi, kiom realigebla estas la ideo. La plano fine aspektis jena:

- Estu moneroj de 1, 3 kaj 10 steloj. Tio ebligas rapidan pagadon de diversaj eblaj monsumoj.
- La moneroj estu malsamkoloraj kaj malsamgrandaj, por ebligi facilan kaj rapidan uzon.
- La koloroj estu ruĝa, flava kaj verda, kaj la simboloj gufo, papago kaj krokodilo.
- La valoro de unu stelo egalas al la plej malgranda kutima elspezo en trinkejo aŭ gufujo, do unu taso da teo aŭ unu glaso da kolao.

La finaj desegnoj estis senditaj kaj 3000 moneroj estis presitaj en oktobro 2012. Bonŝance en la fino de oktobro okazis malgranda renkontiĝo, kiun mi kunorganizis: Klaĉ-Kunveno Post-Somera en Nederlando. Ĝi estis perfekta por testi la novan monsystemon. La publiko ŝatis la monerojn, kaj sukcesis adaptiĝi al ĝia uzado. Post KKPS la Itala Esperanto-Junularo iĝis kuninvestanto de la projekto. La originala valoro estis difinita kiel 4,2 steloj en unu eŭro. Poste la valoro estas ligita

al la inflacie kompensitaj valoroj de eŭro, realo kaj zloto kun pezaj de 76%, 20% kaj 4%. Do same kiel la antaŭa stelo, tiu ĉi stelo teorie tenos sian valoron. Ekde 2012 ĝis 2017 la valoro de unu eŭro en steloj variis inter 4,040 kaj 4,581. La steloj estas ĉefe uzataj en trinkejo de junularaj Esperanto-renkontiĝoj. Ili estas valida pagilo en KKPS 2012-2017, IJF 2013-2017, JES 2012 kaj 2017, SES kaj FESTO 2013 kaj IJK 2015. Krome ili uziĝis en kelkaj trajnkaravanoj kaj eblas mendi ilin poŝte ĉe Aleĉjo aŭ Roĉjo.

La avantaĝoj de steloj en trinkejo estas la facila uzo, la malalta pezo relative al metalaj moneroj, kaj la fiero havi specialan Esperanto-monon. La ĉefa malavantaĝo estas la bezono interŝanĝi alian monon kontraŭ steloj en la komenco de la renkontiĝo.

La kvanto presita en 2012 devus sufiĉi por uzo en eĉ la plej grandaj junularaj renkontiĝoj. Se ilia uzo aŭ kolektado ekster la junulara movado ankaŭ kreskos, tiam dua presado estos pripensinda.

Rogier 'Roĉjo' Huurman

PS: Bildoj: <https://commons.wikimedia.org/wiki/Category:Stelo>

Bonvolu mendi la plastajn Stelojn ĉe rogier.huurman@gmail.com

Saussure-Jaro 2018: La pioniro de la Esperanto-mono estis René de Saussure. Okaze de la 150a reveno de lia naskiĝtago la 17an de mato 2018 aperis arĝenta speciala monero kun la nominalo 100 Steloj.



Afrika Komisiono de UEA serĉas kunlaborantojn

Evoluis la ideo pri "Oficejo de Afrika Komisiono de UEA" sub la ĉefa respondeco de la komisiono. Sube vi trovas liston de diversaj taskoj plenumendaj. Se vi interesiĝas labori por la Afrika Komisiono kaj UEA, bv. kontakti nin. La laboro povas esti farita en iu ajn parto de Afriko; ne gravas ĉu en via hejmo aŭ eventuale en fizika oficejo.

La ideala kandidato estas respondeca, diligenta, laborema, kreema, sperta pri uzo de interreto kaj komputilo, rapide povas tajpi, havas altan lingvonivelon, organizan talenton kaj povas harmonie labori kun aliaj personoj.

Taskoj (ekzemplaj):

✍ aperigo de la bulteno "Esperanto en Afriko" (4 numeroj jare); ✍ prizorgi sociajn retejojn; ✍ subteno al AK pri organizado de eventoj (ekz. seminarioj); ✍ disvastigo de informoj pri UEA; membriĝo kaj okazantaĵoj; ✍ disvastigo de informoj pri konkursoj (ekz. Partoprenu UK); ✍ helpo al lokuloj rilate al disvastigo de Esperanto; ✍ kreo de afiŝoj, informiloj en diversaj lingvoj; ✍ helpo al AK kaj Landaj Asocioj pri gazetara laboro; ✍ eldonagado (afrikaj kulturaĵoj, ekz. libroj ktp.); ✍ akcepto pri petoj (ekz. lernolibroj); ✍ respondi informpetojn el Afriko; ✍ organizado de Esperanto-kursoj en universitatoj; ✍ kolekto de jarraportoj; ✍ flego kaj ĝisdatigo de retpaĝo esperanto-afriko.org; ✍ instigo al trapaso de Esperanto-ekzamenoj; ✍ pedagogia lertigado (instrukapabloj).

Se vi interesiĝas, bv. sendi vian kandidatiĝon kun vivresumo kaj motiveleteron (inkluzive de eventualaj dokumentoj) ĝis 15-03-2018 al oak2018@co.uea.org.

En la motiveletero bv. ankaŭ menci, kiom da horoj vi pretus labori semajne, ĉu vi pretus labori volontule (eventuale por iuj el la menciitaj taskoj), aŭ ĉu vi ŝatus havi honorarion. Se vi ŝatus havi honorarion, bv. informi nin pri viaj ideoj rilate al la honorario. Bv. informi ankaŭ, ĉu vi jam havas komputilon kaj interreton.

Emile Malanda
(Kunordiganto de Afrika Komisiono)

Seminarioj de ILEI en Madrido kaj Kotonuo por trejni instruistojn: aliĝu!

ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, zorgas pri la instruado de Esperanto laŭ kontrakto kun UEA. Venas petoj al ILEI: bonvolu sendi Esperanto-instruistojn. Sekve ILEI plifortigas sian agadon en tiun direkton kaj kreis Esperanto-Instruistan Trejnadon – EIT.

En 2018 ekzistas lertigado per la Reto danke al bonega kunlaboro inter ILEI kaj www.edukado.net kaj ĝia gvidantino D-ino Katalin Kováts.

La studentoj retumas regule por akiri sciojn pri pedagogio, gramatiko kaj metodiko. Kompreneble ili ankaŭ devas stari antaŭ klaso kaj instrui.

Tio okazos kadre de la ILEI-kongreso en Madrido, Hispanio, julie, kaj en Kotonuo, Benino, en novembro, kadre de tutsemajna seminario. En ambaŭ eventoj okazos kursoj, ekzamenoj kaj provlecionoj. Tiuj studentoj fariĝos diplomitaj Esperanto-instruistoj. La programo Reta Instruista Trejnado de Esperanto (RITE) kaj Madrido proponas 24 lokojn. La programo RITE kaj Kotonuo proponas 20 lokojn. Nun aliĝis po dek studentoj. Do ankoraŭ estas eblo salti en la programon, labori kaj diplomigi. Ĉiuj detaloj troviĝas sur la ĉefpaĝo www.ilei.info. Lertigado de altnivelaj instruistoj estas nepra paŝo al la kreskado de esperantistoj kaj movadanoj, do nutro-grundo por UEA.

(Gazetaraj komunikoj de UEA)

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj	
ilei	...ni instruas Esperante!
	
Bonvenon	
Ĉefpaĝo Instancoj Agado Dokumentoj Revuoj Adresoj	  

Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

Folge 37 – Bibliotheken hoffen auf eine Realisierung der Koalitionsvertragsinhalte – Jahresbericht für die Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen

Während ich an diesen Zeilen schreibe, häufen sich die Pressemeldungen ob der Einigung auf eine erneute Große Koalition in Berlin. So gibt es Grund, auf eine Stabilisierung der Politik zu hoffen. Auch der dbv (Deutsche Bibliotheksverband e.V.) meldete sich zu Wort; hofft man doch, dass die hehren Ziele nicht nur bloße Worthülsen bleiben.

Schon vor sehr langer Zeit konnte man, in *Esperanto aktuell* 32(2013) Heft 3, die Folge 13 lesen. Man wird sich wohl nicht mehr daran erinnern. Ich dagegen weiß noch genau, wie emotional das ganze Thema war, ging es doch um den 80. Jahrestag der Bücherverbrennungen durch das NS-Regime. Und bald schon wird es 85 Jahre sein, dass in Deutschland unliebsame Bücher den Flammen anheim gegeben wurden. Dabei ist das gar nicht so selten, wie ich damals schon schrieb. Die Liste weiterer Vorfälle wuchs inzwischen weiter.

Der Bund will sich dafür einsetzen, den „Bibliotheksnutzern unter Wahrung der Vertragsfreiheit einen noch besserer Zugang zum Repertoire von E-Books zu ermöglichen“. Bibliotheken müssen auch im digitalen Umfeld diesem ihrem Auftrag nachkommen können: Teilhabe und Zugang zu Informationen zu gewähren. Dazu braucht es die rechtliche Gleichstellung von E-Books und gedruckten Büchern.

Zu begrüßen ist daher auch die geplante Entwicklung einer nationalen Open-Access-Strategie und einer nationalen Forschungsdaten-Infrastruktur. Auch das Bekenntnis zur Fortführung der Programme zum Erhalt des schriftlichen Kulturgutes bleibt von großer Bedeutung.

Und so formulierte die Vize-Bundesvorsitzende des dbv, Beate Tröger: „Die nur bis zum Jahr 2023 geltenden Regelungen im Urheberrechts-Wissensgesellschafts-Gesetz für den Bildungs- und Wissenschaftsbereich müssen verstetigt werden. Auch die Weiterentwicklung des Urheberrechts auf europäischer Ebene muss unter Berücksichtigung der Bedarfe von Wissenschaft und Forschung entwickelt werden. Die wissenschaftlichen Bibliotheken in Deutschland stehen im digitalen Zeitalter vor großen Herausforderungen, die sie gemeinsam mit politischen Entscheidungsträgern und Mittelgebern gestalten möchten.“ – Wir werden ja sehen, was geschieht ...

Dass neuerdings aufgrund von Animositäten die über Internet zugängliche und von Freiwilligen erstellte digitale Bibliothek „Project Gutenberg“ generell für deutsche Nutzer nicht mehr zugänglich ist, wird nicht gerade von jedermann begrüßt, ist aber auch durch unser deutsches Urheberrecht mit verschuldet.

Sicher trägt da nicht nur die eine Seite die Schuld. Mir zeigt das erneut auf, dass man mit dem Recht nicht zu leichtfertig umgehen darf. Wohlgermerkt: diese Sperre hat keine Auswirkung auf das deutsche Projekt Gutenberg-DE, das man weiter unter seiner Adresse www.projekt.gutenberg.de finden kann!

Jetzt aber zum wesentlichen Inhalt dieser Folge!

„Die Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen blickt auch im 110. Jahr ihres Bestehens auf ein weiteres Jahr erfolgreicher Tätigkeit zurück“ – dass dieses bestimmt keine leere Worthülse ist, sondern Hand und Fuß hat, will ich nachfolgend in aller Kürze belegen.

Seit Dezember 1989 befinden sich unsere Bestände in Aalen, das sind schon mehr als 28 Jahre. Der laufende Betrieb geht wie gewohnt weiter, wenn wir auch einen höheren Arbeitsanfall haben, weil wir einen Großteil der Mehrfachexemplare, die nicht unbedingt ständig verfügbar sein müssen, sowie reines Archivmaterial aus dem Hauptbestand entfernen. Die relative Luftfeuchtigkeit in dem uns zugeteilten Magazinraum ist nun definitiv unter die Grenze von 50% r.F. gesunken, so dass diese Arbeit vorrangig zu tun ist; denn die eigentliche Sammlung braucht Platz für Zuwächse, die essentiell sind, um aktuell und interessant zu bleiben.

Anfragen zu Auskünften und Recherchen bekommen wir laufend, jedoch: die Arbeits- und Personallage (wie sich unsere Benutzungsordnung ausdrückt) ist in der Regel sehr angespannt, da wir nur mit ehrenamtlichen Kräften arbeiten. Und dennoch bemühen wir uns, keine Benutzeranfrage ohne eine Antwort zu lassen. Bei Nachfrage nach Werken aus dem Altbestand, die gemäß Benutzungsordnung als Präsenzbestand nur im Ausnahmefall verliehen werden dürfen, versuchen wir diese in digitalisierter Form anzubieten. Dies ist in einigen Fällen bereits erfolgt; doch müssen wir dabei Kollisionen mit dem Urheberrecht aus dem Weg gehen. Unsere Seiten kurzelinks.de/autor-rajtoj informieren esperantosprachig zu möglicherweise auftretenden Problemen, falls die Fernleih- oder Scanwünsche der Benutzer mit unserem (deutschen) Urheberrecht kollidieren sollten.

Unseren kompletten Geschäftsbericht 2017 erhalten die bisherigen Empfänger in gewohnter Weise in Papierform oder elektronisch. Er wird auch auf den Netzseiten www.esperanto.de/berichte-bibliothek zu finden sein. Für den Fall, dass es bei der Übernahme auf esperanto.de zu Verzögerungen/Problemen kommen sollte, ist er aber auch dort zu finden: kurzelinks.de/SpBib2017.

Nach Pfingsten 2017 besuchte uns Bernhard Tuijer, der Teamleiter der Sammlung für Plansprachen (und Esperantomuseum) in der ÖNB Wien, um die bestehenden gegenseitigen Kontakte weiter zu vertiefen. Frau Heidi Goes ist Doktorandin an der Universität Gent im Fachgebiet

Afrikanische Sprachen und forscht daneben schon mehrere Jahre über die Esperantobewegung in Afrika und vor allem in Niederländisch-Indien (heute: Indonesien); eine neue Publikation wird bald erscheinen. Wir stehen mit ihr deshalb in regem Kontakt und konnten durch vielfältige Recherchen dazu beitragen, vor allem auch durch die Verifikation und Komplettierung bibliografischer Angaben.

Das führte zu einer Vielzahl an Fernleihen, die großen Teils durch Mailverkehr erledigt werden konnten. Im Gegenzug erhielten wir dabei viele Einzelhefte historisch interessanter Zeitschriften aus diesem Themenkreis, die in unserem Bestand noch nicht verfügbar gewesen waren.

Kurz und knapp die **Zahlen zum Geschäftsjahr 2017**: Unser Teilkatalog Monografien verzeichnet jetzt 25.768 und der Teilkatalog Periodika 2.592 Einträge. Als Summe des Buchbestands nennt unser Zugangsbuch 39.450 Titel, und die Periodika bestehen aus 8.837 kompletten Jahrgängen (die losen Einzelhefte haben wir nicht gezählt, schätzen aber deren Anzahl auf etwa 26.500). – Somit beläuft sich der **Gesamtbestand** der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen (inkl. kompletter Zeitschriftenjahrgänge) zu Ende 2017 auf 51.611 bibliografische Einheiten.

Die geleisteten 2.135 Arbeitsstunden der Esperanto-Gruppe Aalen ersparen der Öffentlichen Hand, in der Nutznießung ja die Deutsche Esperanto-Bibliothek Aalen vertraglich steht, eigene Aufwendungen in Höhe von 140.495,-- Euro; das wären in etwa 1,3 Planstellen.

Utho Maier



Sinprezentanto

Estimataj,

Mi nomiĝas Calogero Montalbano, loĝas en la urbeto Agrigento, sude de la insulo Sicilio. Mi estas profesia ĉiĉerono, aprobita de turisma instanco de la Regiono Sicilio por la itala kaj franca lingvoj: mi laboras plejofte en arkeologia parko de la “Valo de la Temploj”, kie troviĝas elstaraj restaĵoj de la antikva helena urbo nomiĝinta Akragas. La Valo de la Temploj estas unu el la plej gravaj pragrekaj lokoj pro la ĉeesto de nombro da temploj. Krome, mi estas esperantisto de ok jaroj: daŭre mi interesiĝas pri la internacia lingvo kaj ĝiaj nuneco kaj evoluo.

Kunigante miajn arkeologiajn konojn kaj mia scipovo de Esperanto, mi ankaŭ plenumas ĉiĉeronadojn en Esperanto; do estas kun granda plezuro kaj entuziasmo, ke mi faras al Via Asocio la suban oferton: Vizito de la Valo de la Temploj por grupoj de esperantistoj (de dek ĝis kvindek personoj) kun la sekva programo: traire de la arkeologia parko, konsistanta el 5 temploj (Juno, Konkordo, Heraklo, Zeŭso, Dioskuroj) plus restaĵoj el la helenaj remparoj plus prakristana nekropolo. La daŭro de la tuta vizito estas 2 horoj. Laŭ eventuala plia intereso, mi kromproponas viziton de la ĉi tiea arkeologia Muzeo. Ĉi-kaze la tuta daŭro de la vizito estas tri horo kaj duono. Kiel esperantisto, favore al samideanoj, mi aplikos ĝis la fino de aprilo rabaton al ordinaraj tarifoj starigitaj de Sicila administracio: 80 eŭroj anstataŭ 130 por vizito de Valo kaj 110 eŭroj anstataŭ 150 por vizito de la valo plus muzeo.

Mi sendas kopion de mia ĉiĉerona rajtpapero (licenco) kaj foton de la plej grava kaj fama monumento de la urbo Agrigento (pliajn fotojn de monumentoj ktp vi trovos en mia retpaĝo www.guidaagrigento.it). Esperante, ke vi atentis mian oferteton, elkore salutas Calogero Montalbano, ĉiĉerono el Agrigento, Sicilio, Italio, Poŝtelefon-numero: +39 333 48 82 360.



Ni funebras / Traueranzeige

Wanda Fethke-Grossmann forpasis la 22an de marto 2018 en la aĝo de 95 jaroj. Ŝi estis la dua edzino de la filmreĝisoro kaj Esperanto-verkisto Jan Fethke (ps. Jean Forge, 1903-80). En 2003 ŝi ricevis la honoran membrecon de la Esperanto-Ligo Berlin.



La 9-a Junulara E-Semajno – JES



**okazis de la 26-a de decembro 2017
ĝis la 2-a de januaro 2018
en Pollando, en la urbo Ŝĉecino
(pole Szczecin, germane Stettin)
ĉe la Balta Maro, tuj apud
la germana landlimo**

Gejunuloj pri la 9-a Junulara Esperanto-Semajno en Ŝĉecino

JES 2017 estis malaĉa! Dum la pasinta JES, mi estis samtempe partoprenantino en ERASMUS-trejnado. Ties celo estas eduki esperantoinstruistojn. Mi timegis la trejnadon antaŭe, sed mi rapide konstatis, ke tio tute ne necesis. Ĝi ne estas nur intensa, sed ankaŭ interesa, kaj dank al la kunpartoprenantoj sufiĉe amuza. Ni laboris, diskutis, kantis kaj ridis en agrabla atmosfero. La temoj estis ekzemple krei taskojn por gelernantoj, eraroj kiujn instruistoj povas fari, memfida apero kaj kiel kondukti en iom malfacilaj situacioj.

La JESa programo (de kiu mi preskaŭ nenion faris pro la tempo-intensa trejnado) inkludis prelegojn ekz. pri genra egaleco, promenon al la urbo centro, poemojn kaj danclecionojn. Granda novaĵo estis patatajumadokurso. Neniam mi aŭdis pri tio! Mi diros nenion ĉar oni devas vidi tion mem. Tamen, mi supozas ke la plej bonaj momentoj kaj konversacioj ĉiam okazas aparte de la programo, ĉefe malfrue vespere en la drinkejo aŭ gufujo. Dum tiu-ĉi JES, mi dormis en amasloĝejo por la unua fojo. Ni estis proksimume dek personoj en normala klasĉambro. Estas nerekomendebla por ĉiuj kiuj ŝatas bone kaj sufiĉe dormi. Sed ni amuziĝis kiam ni desegnis sur la tabulon, uzis plastajn botelojn kiel keglojn kaj havis profundajn konversaciojn.

Eĉ la plej grava tago, la novjarfesto kun la nokta bufedo, malaperis en la fono inter ĉiuj aferoj, kiujn mi lernis kaj travivis dum la semajno!

Cornelia Luszczyk



Cornelia Luszczyk

La ĉi-jara JES estis sufiĉe kaose organizita, tamen mi ĝuis. Eĉ se mi iom nervoziĝis pri manko de ĝustatempa informado pri la post-lastmomente anoncitaj programoj, pri la translokiĝo al nova, maltaŭga ejo... kaj iom pli, la JES temis por mi pri renkonti miajn karajn amikojn. Kaj eĉ se ne ni ĉiuj sukcesis loĝi en la sama ejo, la plejparto ja jes, do ni ĝuis avantaĝojn de la "ĉio sub la sama tegmento". Malgraŭ mia plendemo pri la JES mi dankemas al la organiza teamo, ĉar ili kreis okazon por festi kun tiuj, kiuj gravas al mi. Certe estis mia plej bela novjarfesto.

Saci (Sarolta Bagó)



La 9a JES en Ŝĉecino denove havis tiun senton, kiun mi amas. Multaj amikoj el diversaj landoj venis kaj mi bezonus monaton por resti sufiĉe da tempo kun ĉiuj amikoj, kiuj venis. Bedaŭrinde la programo estis sufiĉe ĥaosa, tiel gravaj programeroj estis samtempaj aŭ la homoj eĉ ne sciis





pri ili. Mi ankaŭ volus plendi pri la manĝo, sed kiel mi skribis en unu de miaj kantoj: "...la manĝo ne taŭgas por la ventro, ne plendu sed helpu organizi la venontan eventon". Do se vi samopinias, ni komune certigu ke la manĝaĵo por la jubilea, deka JES en germanio estu bonkvalita!

Mi ege antaŭĝojas jam venontan novjaron kaj deziras al ĉiuj bonan jaron, ĝis ni denove revidos.

Jonny M (Jonas Marx)



Jen mia JES: Estis tre amuza renkontiĝo, mi ĝojis pri la multaj novuloj kiujn mi povis ekkoni, la bonega etoso kaj la diverseco de interesaj programeroj! Oni bonege povis festi, mi ankoraŭ bone memoras la antaŭsilvestran nokton, dum kiu mi festis ĝis la sesa. Bedaŭrinde mi ne estis tiom motivita dum la silvestra nokto mem, ĉar multaj aferoj prokrastiĝis, la bongusta bufedo rapide malplenis kaj en la nokto la muziko ne vere plaĉis al mi kaj restis samstila... Mi proponas ŝanĝon de DĴo aŭ diversstilajn kantojn, ne malfacilas lasi la partoprenantojn kontribui al la kantarlisto. Krome mi ŝatis la ejon, kvankam estis iom malvarma kaj laŭta.


Alina Brücker



La grupfoton sur la paĝo 27 faris Ivo Miesen el Nederlando. La ĉi-supra foto en la koridoro temas pri la trinkomanĝa nokto, kiu okazis tuj antaŭ la internacia vespero. Ĝin faris Robin van der Vliet.

Saluton, mia nomo estas David Mamsch kaj origine mi venas el Lepsiko (germane Leipzig). Mia "Esperanto-vivo" komenciĝis en 2015 ĉe SES (Somera Esperanto-Studado) en Slovakio, kiu estis mia unua internacia evento.

Nun mi eĉ loĝas en Slovakio, kie mi pasigas unujaran volontuladon (*EVS - european voluntary service*) en la organizo "edukado@interreto". Tiel mi havas la ŝancon lerni de la homoj, kiuj ĉiujare organizas SES-on kaj kiuj organizis UK-on 2016 en Nitra (Slovakio) kaj la *Polyglot Gathering* (plurlingvula kunveno, kiu okazas unufoje jare kaj kunigas plurlingvulojn kaj lingvoŝatantojn el la tuta mondo) en Bratislava. Dum mia volontulado mi ĉefe okupiĝas pri tradukoj kaj la organizado kaj planado de aranĝoj.



En la estraro de GEJ mi ŝatus helpi al la organizado de JES 2018 kaj eventuale transdoni sciojn kaj spertojn al estontaj organizantoj. Krom Esperanto mi ŝatas vojaĝi kaj pli-malpli ĉion, kio iel rilatas al muziko.

Kalendaro

Aprilo 2018

20 – 28: 8-a PRINTEMPaS en la Esperanto-Kastelo Greziljono, Baugé, Francio. Intensaj kursoj kun Zsófia Kóródy el Herzberg, Marion Quenut kaj Christophe Chazarein el Tuluzo, konferencoj kun Nijolė Stakeniene el Vilno. En la fino de la kursoj: KER-ekzameno! (B1, B2, C1). - Org: MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio, rete: kastelo@gresillon.org

27 apr - 01 maj: 5-a Centrejo en Žďár nad Sázavou, Ĉeĥio. Ĉefa renkontiĝo de Ĉeĥa Esperanto-Junularo. Organizas: Ĉeĥa Esperanto-Junularo. Retadreso: mladez@esperanto.cz, tel: +420605502231

Majo 2018

01: Ponta Festo en Frankfurt (Oder), Germanio. Informstando pri Esperanto ene de popola festo okaze de la 1-a de majo kaj vespera agrabla kaj familia kunveno. Organizas: Ronald Schindler, Eberswalder Str. 15, D-15234 Frankfurt (Oder) - retadreso: ronaldschindler@web.de

02 - 06: 47-a Lingva Seminario en Ĉeĥa Paradizo, en Skokovy, Ĉeĥio. Semajnfina seminario en familia pensiono Espero, kiu troviĝas en pitoreska okcidenta parto de sabloŝtona Bohemia Paradizo (norde de Prago), plena de divespecaj turismaj allogaĵoj (kulturaj kaj naturaj). Organizas: Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, Mladá Boleslav 29301. Retadreso: drahotovaesperanto@seznam.cz

05 – 09: ReVe, Renkontiĝo Vegana en Baugé, Francio, en Esperanto-Kastelo Greziljono. Organizas: MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio, rete: kastelo@gresillon.org

05 – 09: Korusa renkonto de Interkant' kun Zdravka Bojčeva en Baugé, Francio, en Esperanto-Kastelo Greziljono. Organizas: MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio, rete: kastelo@gresillon.org

10 – 13: Skandinava/Trilanda kongreso de Esperanto sur marŝipo inter Kopenhago/Danio kaj Oslo/Norvegio. Surŝipa konferenco inter Kopenhago kaj Oslo memore al la unua skandinava Esperanto-kongreso antaŭ 100 jaroj. Okazos jarkunvenoj de SEF, DEA kaj NEL. Estos komunaj manĝoj kaj multe da libera tempo por pasigi en la ejoj de la ŝipo kun (novaj) Esperanto-konatoj. Org.: Sveda Esperanto-Federacio, Ann-Louise Åkerlund, Box 2276, SE-103 17 Stockholm, Svedio. Retadreso: skespkon2018@esperantoforbundet.se

11 - 13: Tutslovakia Esperanto-Renkontiĝo 2018 en Levice, Slovakio. La Tutslovakia Esperanto-Renkontiĝo (TER) invitas vin al la urbo Levice! Organizas: SKEF. Retadreso: skef@esperanto.sk, tel: +421 (0)902 203369 (Peter Baláž)

18 – 21: Trilanda Esperanto-Kongreso (franca, germana,

luksemburga) en Zweibrücken (DE). Aliĝu ĉe: www.esperanto.de/gek2018

18 - 21: KEKSO, Kreativa Esperanto-KurSO en Zweibrücken, Germanio. KEKSO estas eta Esperanto-renkontiĝo kun 15 ĝis 20 partoprenantoj regule; do plej bone por ekkonatiĝi kun Esperantujo. Precipe KEKSO estas por junuloj, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj simple volas ekscii kiel la lingvo funkcias. Ni proponas lingvo-kursojn por komencantoj kaj progresintoj, kie en malgranda grupo la reguloj de la lingvo lerneblas. Krome ankaŭ estas proponataj laborgrupoj pri aliaj projektoj ligita al la lingvo. Eblas realigi ekzemple etan filmon, aŭskultadojn aŭ teatraĵojn. Sed plej grave la semajnfino amuzu. La diversaj partoprenantoj el ĉiuj regionoj germanaj kaj el aliaj landoj interkonatiĝu, kune kuiru, ludu aŭ muzikumu, ktp. Organizas: Germana Esperanto Junularo - retadreso: gej@esperanto.de

19 – 21: Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj en Wrocław, Pollando. La Festivalo okazas ĉiujare en majo en du kategorioj: 1. koruso aŭ ensemblo / 2. solisto. Ĉiu partoprenanto kantas du kantojn: unu en Esperanto, la alian en sia nacia aŭ fremda lingvo. Pritaksataj estas nur Esperantaj kantoj. La festivalon patronas la urbestro de Wrocław. La premiitoj ricevas diplomojn kaj pokalojn kaj ĉiuj partoprenantoj ricevas diplomon pro la partopreno. Inf: Malgorsia Komarnicka, rete: informado.eo@gmail.com

19 - 24: Tria Interkultura Majrendevuo en Wrocław kaj Góra, Pollando. Ni komencos en Wrocław per la Sesa Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj kaj finos en Góra per granda Interkultura Koncerto por la loĝantoj de la urbo. Organizas: Eŭropa Centro de Interkultura Edukado kaj Esperanto-Klubo en Góra. Ĉiaj informoj estas riceveblaj ĉe la adreso: festivalo.eo@gmail.com (skribante en la temo de la mesaĝo: majrendevuo), aŭ telefone: +48 692 551 131, +48 605 292 335

19 – 25: 70-a kongreso de IFEF en Wrocław, Pollando. Jara kongreso de IFEF kun fakaj kunsidoj kaj ekskursoj en la regiono. Organizantoj invitas ne nur fervojistojn – por riĉigi la komunumon kaj doni eblecon vizitadi unu el plej belaj urboj en Pollando. Prezentaĵo pri la urbo kaj kongreso atingeblas <https://drive.google.com/file/d/0BwYR30yvlCLvSIhHdWNmMIZiaTA/view?usp=sharing> ĉi tie. Org: Internacia Fervojista E-Asocio, rete: wlib24@o2.pl

30 maj - 03.jun: Polyglot Gathering en Bratislavo, Slovakio. Polyglot Gathering estas neformala evento, kiu okazas ĉiujare kaj kunigas poligotojn (homojn, kiuj parolas plurajn lingvojn) kaj lingvoentuziasmojn de la tuta mondo. Ĝi estas kvintaga evento kun prelegoj, atelieroj kaj sociaj agadoj por ĉiuj, kiuj amas kaj ĝuas lingvojn. Organizas: Lydia Machová de language mentoring.com kaj Peter Baláž de E@L. Retadreso: info@polyglotbratislava.com

30 maj – 08 jun: Roskilde Festivalo en Roskilde, Danio. Ĝuu senpagan aliron al la plej granda, gaja rok-festivalo de Danio. Ni uzas nian lingvon praktike dum volontula laboro ĉe pordego. Ni laboras, kuiras, loĝas kaj festas kune. Organizas Dana Esperanta Junulara Organizo, retadreso: roskildefestivalo@gmail.com

Junio 2018

01 - 03: Esperantaj Tagoj de Krakovo en Krakovo, Pollando. Tradicia aranĝo de krakova esperantistaro kun abunda prelega kaj arta programoj. Komenco de festado okaze de datreveno de lokiĝo de la iama reĝa ĉefurbo de Pollando. Organizas: Krakova Societo ESPERANTO, Kulturcentro 'Podgórze', ul. Sokolska 13, PL-30-510 Kraków, Pollando. Retadreso: kse.krakovo@gmail.com

08 - 10: 20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco en Bjelovar, Kroatio. La konferenca ĉeftemo estas "Alp-Adrio kaj Danubio", kaj oni krome diskutos pri la temo "Publikaj rilatoj de esperantistoj kun neesperantistaj medioj". Organizas: Bjelovara Esperantista Societo, Vlatka Mačeka 14, HR-43000 Bjelovar, Kroatio. Retadreso: esperanto.bjelovar@gmail.com



12 - 23: 40-a jubilea Ĉebalta Esperantista Printempo en Mielno, Pollando. La aranĝo verŝajne impresos vin forte pro neripetebla esperantista etoso kaj pro interesa kaj riĉa E-programo. Dum la aranĝo vi povos profundigi vian lingvokonon, ligi novajn amikajn kontaktojn kaj agrable pasigi la tempon ĉe la Balta Maro. Organizas: Pola Esperanto-Asocio Filio en Gliwice, skr. poczt. 21, 44-101 Gliwice -1, Pollando. Retadreso: stanislaw.mandrak@gmail.com, tel: +48-660 427 967

16: Lima renkontiĝo (LiRe) 2018 en Fortikaĵo Königstein, Germanio. Loko de renkonto 11:00 h stacidomo Bad Schandau ĉe la fervoja linio inter Dresdno kaj Prago, 11:30 h komuna uzado de la trajno al ripozo loko Königstein, 12.00 h uzo de la aŭtobuso al fortikaĵo, tie uzado de la herbejo por pikniko, poste vizito de konstruaĵo de la fortikaĵo, 16:00 h reveturo al stacidomo Königstein, ĉirkaŭ 16:30 h fino de la aranĝo. Organizas: Esperanto grupo Halle (Saale), Hans-Joachim Gunkel, Voss Str. 7, D-06110 Halle, Germanio. Retadreso: HajoGunkel@t-online.de

Julio 2018

07 - 14: 84-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj (IKBE) en la hotelo "Tomislavov dom" sur la monto Medvednica apud Zagrebo. Kongresa temo: "Kion, kiel kaj kiom ni legas?" - Organizanto: Antun Kovač, antun2805@gmail.com, tel: +385 98 9935712, kaj Dragan Štoković, stokovic@globalnet.hr

09 - 16: 4-a Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso en Baugé, Francio, en Esperanto-Kastelo Grezillon. Organizas: MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio, rete: kastelo@gresillon.org

09 - 27: 2-a Maratona Esperanto-kurso dum 18 tagoj (7+5+6) kun Perla Mielo, Louis Jeuland, Nina Danylyuk, Mikaelo Bronŝtejn en Baugé, Francio, en Esperanto-Kastelo Grezillon. Organizas: MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio, rete: kastelo@gresillon.org

14 - 21: SEFT - Somera Esperanto-Familia/Feria Tendaro en Thomsdorf, Germanio. SEFT ne havas fiksitajn programon, nur okazas tio, kion la partoprenantoj mem aranĝas. Ni helpas unu la alian kaj ferias komune. Pliaj informoj: tlustulimu@web.de

14 - 22: Somera Esperanto-Studado, SES - "La plej granda somera Esperanto-lernejo tutmonde!" Internacia renkontiĝo de interretaj Esperanto-lernantoj kaj aliaj komencantoj en la urbo Liptovský Mikuláš, Slovakio. Antaŭtagmeze lernado, posttagmeze ekskursoj, prelegoj, ludoj, vespere koncertoj, filmoj, amuzado. Inf.: Peter Balaž, rete: ses@ikso.net

15 - 21: Turisma semajno en la regiono Anjou, kun profesia ĉiĉerono en Baugé, Francio. Catherine Kremer, profesia ĉiĉerono-prelegisto, gvidos la grupon dum la semajno en la diversaj kasteloj kaj vidindaĵoj, kiujn ŝi ilustras per multaj anekdotoj kaj aparta atento pri la arto de murtapiŝoj. Organizas: Esperanto-Kastelo Grezillon, MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio. Retadreso: kastelo@gresillon.org

16 - 21: Speciala semajno kun Turismaj vizitoj pri la artoj, kursoj de Esperanto kaj de la franca en Baugé, Francio, en Esperanto-Kastelo Grezillon. Organizas: MCE Grésillon, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio, rete: kastelo@gresillon.org

21 - 27: Internacia Esperanto-Konferenco, IEK 2018 en Kastelo Grezillon Francio. La 30-a konferenco de la 30-jara OSIEK, kun la profesia organiza laboro de la Kastelo Grezillon, kun paralela kaj antaŭkonferenca aranĝo. Ĉi-jara ĉeftemo: Esperanto en artoj. Prelegoj, ekskursoj, atribuo de OSIEK-premio. Informoj kaj aliĝo: Kastelo Grezillon, St. Martin d'Arcé, FR-49150 Baugé-en-Anjou, Francio, retpoŝto: kastelo@gresillon.org

21 - 28: 51-a Kongreso de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) en Madrido, Hispanio. Kongresa temo "La kultura heredaĵo de Esperanto". El la programo: Interkona frandvespero,

instruista trejnad, Esperanto-kursoj por komencantoj kaj komencintoj, prelegoj kaj atelieroj de konferencanoj, lingva festivalo, simpozio pri la konferenca temo, konferenca bankedo, distraj vesperoj, literatura kafejo, ekskursoj. Post la fermo karavana transiro al la UK en Lisbono

21 - 28: 39-a Renkontiĝo de Esperanto-Familioj, REF en Mühlhausen, Thüringen, N51°13'/E10°27', Germanio. Komuna restado de familioj kiuj uzas Esperanton kiel unu el siaj hejmaj aŭ familiaj lingvoj. Varia programo, kiun aranĝas kaj plenumas la partoprenantoj mem - **gepatroj kun infanoj: komuna kantado, skeĉoj, filmvesperoj, rakont-vesperoj, koncertoj, plurtaga serĉado de fantomo, promenoj, ekskursoj, gepatraj interkonsiliĝoj, lokaj popoldancoj, sportoj teamaj kaj tandemaj, lingvaj kaj E-kulturaj atelieroj por infanoj kaj plenkreskuloj.** Organizas: Carolin kaj Robert Weemeyer - retadreso: robert.weemeyer@esperanto.de

28 jul - 04 aŭg: 103-a Universala Kongreso de Esperanto en Lisbono, Portugalio. Kongresa temo: "Kulturoj, lingvoj, tutmondigo: kien nun? Rete: <https://uea.org/kongresoj/UK/2018>, reta mendilo: <https://uea.org/kongresoj/mendilo>, kongresa bulteno: https://uea.org/pdf/DuaBulteno2018_malpeza.pdf



El Gazetara Komunikado de UEA:

SUBTENEblo POR PARTOPRENI LA UK-ON EN LISBONO

Danke al malavaraĵ donacintoj al Fondaĵo Partoprenu UK-on, UEA havas la eblon subteni la aliĝotizon de kelkaj kongresanoj dum la Universala Kongreso en Lisbono. Pliaj informoj ĉe: <http://tejo.org/partoprenu-senpage-la-103-universalan-kongreson-en-lisbono-2018/>

28 jul - 04 aŭg: 47-a IIK - Internacia Infana-Adoleskanta Kongreseto dum la UK - ĉe Lisbono, Portugalio. Amuziĝo en Esperanto dum la UK-semajno por lerneaj grupoj kaj gefiloj de UK-anoj - temo: "Delfenoj kaj dinosaŭroj". Informoj: infana.kongreseto@gmail.com

28 jul - 04. aŭg: Kunveno ELF-AREK & ENA en Lisbono, Portugalio. Esperantaj filatelintoj kaj numismatoj kunlaboros por kunveni membrojn kaj aliajn samideanojn. Tute senkoste! Organizas: ELF-AREK & ENA, Merelhof 8, B-3300 Tienen, Belgio. Retadreso: bert.boon@skynet.be

Decembro 2018

27 dec - 03 jan: LUMINESK' - la silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio en Königswinter/Germanio. Demandoj ĉe Andreas Diemel: demandoj@luminesk.de aŭ telefone +49 203 2964 877

27 dec - 03 jan: La 17a Novjara Renkontiĝo en Wisebaden/Germanio. Informoj ĉe <http://www.esperantoland.org/nr/index.shtml#nr>

Aktualaj informoj troveblas ankaŭ ĉe:
<http://www.eventoj.hu/2016.htm>



Fotoj el Zweibrücken, urbo de la Trilanda
Esperanto-Kongreso dum Pentekosto 2018